



MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 4

Aprilo 2026 Kol. 488/42

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

Enhavo: Proverboj, Bapto, La 1-a de majo, Memore al Kálmán Kolocsay kaj Wiliam Auld, ILEF - fotokonkurso, Rulseĝuloj en la trajnoj.

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

Popolaj proverboj en Ĉeĥio

APRILO

Farmisto sekan aprilon ne ŝatas, sed pro la malseko ĝin laŭdas.

Dum marto apud forno ni tenu nin, aprile tie ni ankoraŭ restu.

Aprila neĝo, riĉa herbo.

Arbeton se vi aprile plantos, dum la sama datumo vi multe rikoltos.

Se aprila vetero ofte ŝanĝiĝas, multe da fojno kaj greno ĝi alportos.

Aprilo tempas kaj viroj aktivas.

Aprilo pluva, rikolto riĉa.

Bapto (prezento) de nova poŝvortaro

La 11-an de marto 2026 okazis en Prago bapto de du libroj el la eldonejo KAVA-PECH: "Permanento" pri la graveco de movado por la vivo de s-ino Kateřina Macháčová kaj "Poŝvortaro" de Miroslav Malovec, prezentitaj de s-roj Petr

Chrdle kaj Tomáš Břicháček. Post la baptito okazis regalo por festi la 80-an naskiĝtagon de s-ro Chrdle. Ni ĉiuj, kiuj konas Petron, kuniĝas por deziri al li bonan sanon kaj viklecon dum la multaj venontaj jaroj.

La 1-a de majo

La 1-a de majo estas oficiale Internacia Tago de Laboro en dekoj da landoj en la mondo, inkluzive de Ĉeĥio. Ĝi memorigas la manifestacion de la 1-a de majo 1886, kiam tricent miloj da



laboristoj el Ĉikago, Usono, batalis surstrate por okhora labortago kaj por la sama salajro. Ĉi tiu manifestacio kulminis kvar tagojn poste per la tumulto sur Haymarket kaj postaj ekzekutoj. Tamen, la 1-an de majo 1888, usonaj laboristoj manifestaciis en ĉiuj usonaj ŝtatoj. Kaj sekvontjare, la Marksisma Internacia Socialista Kongreso kunvenis en Parizo, kaj fondis la Duan

Internacion. Ĝi adoptis rezolucion pri granda internacia manifestacio, subtenanta la postulojn de la laborista klaso pri okhora labortago. Tamen, la plej grandaj manifestacioj ankoraŭ okazis en Usono, kie, paradokse, la 1-a de majo hodiaŭ ne estas Tago de Laboro kaj homoj ne havas liberan tagon tie.

Kvankam la kalendaro oficiale deklaras, ke la 1-a de majo estas la Tago de la Laboro, la plej multaj el ni, en Ĉeĥio, verŝajne asocias ĉi tiun tagon ĉefe kun amo. Ankaŭ danke al la lirika poemo *Majo* de Karel Hynek Mácha. Tamen, homoj asociis la 1-an de majo kun amo kaj nova vivo ekde antikvaj tempoj.

Antaŭkristanaj kulturoj en Eŭropo konsideris ĉi tiun tagon magia. Kaj ĉar la nova tago komenciĝis post sunsubiro, ne noktomeze, la 1-a de majo komencis esti festata la 30-an de aprilo post mallumiĝo per bruligado de fajroj, starigado de ornamitaj arboj - majarboj - kaj dancado sub kaj ĉirkaŭ la majarbo. Ĉi tio simbolis la definitivan venkon de la Suno super la vintro kaj alvenon de varmaj tagoj, kiam ne frostas longe eĉ nokte. En la lando de la gaŭlaj lingvoj, ĉi tiu tago nomiĝis *Beltaine*. Germanaj, skandinavaj kaj aliaj eŭropaj popoloj tiam nomas la nokton de la 30-a de aprilo ĝis la 1-a de majo en la ĉeĥa, ĝi estas pli ofte nomata la nokto de Filipojakubaj fajroj kaj hodiaŭ ĝi estas konata ĉefe kiel la "bruligo de sorĉistinoj".

Kompilis Eva Pazourková, tradukis L.S.

MEMORE AL KÁLMÁN KALOCSAY KAJ WILLIAM AULD

En 2026 ni retrospektas 50 jarojn post la forpaso de Kálmán Kalocsay (1891–1976) kaj 20 jarojn post la forpaso de William Auld (1924–2006), du el la plej gravaj poetoj, tradukistoj kaj kulturaj organizantoj en la historio de Esperanto. Okaze de tiuj memordatrevenoj Universala Esperanto-Asocio (UEA) lanĉas la iniciatojn #Kalocsay50 kaj #Auld20 por instigi la realigon de serio de kulturaj agadoj dum la jaro omaĝe al la poetoj kaj iliaj verkaroj kaj heredaĵoj.

Kalocsay estis ne nur elstara poeto, sed ankaŭ stilnormiganto kaj kunredaktoro de la revuo *Literatura Mondo*, kiu grave markis epokon en la evoluo de la Esperanta literaturo. Per siaj tradukoj de mondliteraturaj klasikuloj kaj per sia propra poezio li montris

la esprimkapablon de Esperanto je la plej alta arta nivelo. Samtempe li aktive laboris por videbligi aliajn verkistojn kaj por konstrui ampleksan panoramon de la kultura vivo en nia lingvo (kion simile faris ankaŭ Auld).

La 27-an de februaro 2026 ni atingis la 50 jarojn sen la verkanta plumo de Kalocsay. Kiel la unuan simbolan agon la Libroservo de UEA proponis la libron *Izolo*, poemaron eldonitan en 1977, unu jaron post la morto de la aŭtoro, sed mem preparitan por eldono en 1939, kio ne okazis pro la Dua Mondmilito. Kontribuis por la finfina eldono Auld mem, pro kio tiu leginda libro bone simbolas la daton.

La 20-an de februaro 2026 la prezidanto de UEA speciale kulture intervenis dum la 10-a Kuba Esperanto-Renkontiĝo, en Havano, kiun li persone partoprenis kiel honora gasto kaj festpreleganto. Fernando Maia Jr. prezentis kaj deklamis ne nur el *Izolo*, sed ankaŭ el la libroj *Rimportretoj* kaj *Rimletero*j (ambaŭ lige kun Auld). La 21-an de februaro estis Tago de la Gepatra Lingvo kaj la Esperanto-Klubo de Debrecen, Hungario, renkontiĝis ĉe la Biblioteko *Méliusz* por paroli pri Kalocsay kaj lia verkaro. Kaj la 27-an de februaro, en Budapeŝto, reprezentantoj de hungaraj Esperanto-organizaĵoj kaj UEA omaĝis al Kalocsay per publika florkronado ĉe la memortabulo sur lia iama loĝdomo, ĉe la strato *Nyúl* n-ro 4. UEA dankas al László Szilvási por organizado de ĉi tiu evento kunlabore kun la Komisiono de UEA pri ZEO-j kaj la estraranino de UEA pri kulturo, Zdravka Boytcheva.

“Kalocsay estas konata kiel poeto kaj tradukisto, sed lia talento estis pli vasta: li ankaŭ interesiĝis pri muziko kaj eĉ mem komponis muzikon por kelkaj el siaj poemoj kaj tradukoj. En 2026 ni volas montri Kaloĉajon ne nur kiel gravan historian figuron, sed kiel vivan inspirfonton por kreado kaj kleriĝo, por plu sonigi la Esperantan kulturon al la nunaj kaj novaj generacioj”, komentis Boytcheva. “El la laboro de Ada Csiszár, proksima persona kunlaboranto de Kalocsay kaj parta heredanto de liaj aŭtoraj rajtoj, eblas scii, ke la

muzikemon li heredis de sia patro, kiu elstare bone ludis violonon, kaj ke dum siaj studentaj jaroj Kalocsay lernis ludi pianon kaj lerte ludis fluton”, kompletigas Szilvási. Danke al la laboro de Csiszár kaj hungaraj Esperantistoj, nun ekzistas retejo, kie oni povas senpage legi aŭ elŝuti preskaŭ ĉiujn verkojn de kaj pri Kalocsay.

Antaŭviditaj pri #Kalocsay50 kaj #Auld20 estas programeroj okaze la 111-a Universala Kongreso de Esperanto en Graco, Aŭstrio, kaj okaze la Virtuala Kongreso, kunlabore kun Akademio Literatura de Esperanto. El la Gazetaraj Komunikoj de UEA.

ILEF-FOTOKONKURSO 2026 – “UNU MONDO EN BILDOJ” ALVOKO AL LA TUTMONDA ESPERANTA KOMUNUMO

UEA kunlabore kun Internacia Ligo de Esperantistaj Fotistoj (ILEF) kaj la redakcio de la revuo *Literatura Vivo* kore invitas esperantistojn tra la tuta mondo partopreni en la ILEF-Fotokonkurso 2026 – “Unu Mondo en Bildoj”, aŭspiciata de UEA. Per lumo ni pontas la mondon: per unu sola bildo ni povas rakonti historion, esprimi senton kaj montri la spiriton de Esperanto sen bezono de vortoj.

Fotarto estas universala lingvo. Ĝi transpasas landlimojn, kulturojn kaj aĝojn, kaj ĝuste pro tio ĝi nature akordas kun la ideo de Esperanto. Ĉi tiu konkurso celas antaŭenigi fotarton inter esperantistoj kaj inviti ilin kapti momentojn de homa digno, amikeco, diverseco kaj komuna sperto – momentojn, kiuj montras, ke ni vere kundividas unu mondon.

La konkurso estas malfermita al ĉiuj esperantistoj, sendepende de spertnivele aŭ teknikaj rimedoj. Akceptiĝas ĝis tri propraj fotoj (koloraj aŭ nigra-blankaj), faritaj per fotilo aŭ poŝtelefono. La verkoj devas esti originalaj kaj antaŭe ne publikigitaj en aliaj konkursoj aŭ komunikiloj. Bildoj tute aŭ parte generitaj per artefarita intelekto ne

estas akceptataj: ni serĉas la homan rigardon, sentemon kaj respondecon de la fotisto.

La fotojn bonvolu sendi ĝis la **1-a de junio 2026** al info@literaturavivo.com. La plena regularo, kun teknikaj postuloj, rajtoj kaj juĝkriterioj, estas havebla en la oficiala dokumento ĉe www.ilef.info.

Internacia jurio elektos la plej elstarajn verkojn. La gajnintoj estos anoncitaj komence de aŭgusto 2026, dum la 111-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Graz (Aŭstrio). Elektitaj fotoj estos prezentitaj kaj publikigitaj en *Literatura Vivo*, kaj parto de ili aperos en reta ekspozicio.

La subteno de UEA al la ILEF-konkurso respegulas la strategian planon AKIRI, aparte la celojn pri komunuma reto kaj kultura fortigo de la kampo Kunlaborado. Kadre de tio UEA ampleksigas sian kulturen agadon al diversaj kulturaj kampoj.

Per via foto vi povas montri, kiel Esperanto vivas en vizaĝoj, gestoj, lokoj kaj lumo. Rigardu. Kaptu. Kundividu. Ni montru kune al la mondo: unu mondo, multaj bildoj, komuna spirito. En la nomo de UEA, ILEF kaj la redakcio de *Literatura Vivo*, ni atendas viajn fotojn kun granda intereso. Se vi ankoraŭ ne aliĝis al la 111-a UK, aliĝu per <https://uk.esperanto.net>. El la Gazetaraj Komunikoj de UEA

Pli kaj pli da rulseĝuloj en la trajnoj

Ĉefaj Fervojoj anoncas la plej grandan nombron de vojaĝoj kun asist-servoj. La nombro de trajnvojaĝoj de handikapuloj kun asistado atingis unuan fojon en la historio pli ol dek mil da uzadoj.

Kaj intereso pri uzado de fervojservoj inter handikapitoj pli kreskas.

Ĉiujare utiligas servojn de la plej granda fervoja servodonanto pli ol miliono da personoj kun handikapo.

La Ĉeĥaj Fervojoj pasintjare prizorgis entute 10 mil asistadojn.

Plejparte temas pri akompanado de personoj en rulseĝoj por envagonigi kaj elvagonigi ilin ĉe trajnoj kun planko je kutima nivelo aŭ pri asistado ĉe transporto de nevidantoj, kiuj dum sia vojaĝo moviĝas en nekonata medio.

Multaj el ili kapablas vojaĝi sen asistado. Dank' al centoj da basplankaj vagonoj ekipitaj per teleskopaj platformoj kaj



vagonaroj ekipitaj per moderna informsystemo kun haptikiloj (tuŝiloj) kaj skribaĵo per brailaj literoj.

La plej uzata asistado en enlanda trafiko inter handikapitoj estas sur la itinero Brno-Praha. En interŝtata trafiko estas la plej uzata itinero Prago-Vieno kaj reen. Ĉeĥaj Fervojoj transportas pli ol 600 milojn da pasaĝeroj kun legitimilo de handikapulo. Ili transportas pli ol unu milionon da vojaĝantoj jare. La plej multaj el ili ne bezonas vojaĝasistadon. Pli ol tri miloj da basplankaj

trajnoj, indikitaj en horaroj kaj priservataj pere de la plej modernaj trajnunuoj, estas uzeblaj sen aparta mendo kaj sen asistado de dungitoj de la servodonanto.

L. Hakl kun esperantistoj dum seminario en Choceň.



INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**

Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice

Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová

Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,

530 03 PARDUBICE, CZ tel. +420 721 537 970

e-mail: aeh@esperanto-aeh.eu interreto: www.esperanto-aeh.eu

Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010

Bankovní spojení: Fio banka, číslo účtu AEH 2801322017, kód banky 2010

IBAN: CZ3520100000002801322017 **SWIFT/BIC:** FIOBCZPPXXX

La jarabono de Informilo **22 €** (en kovertoj), aŭ **11 €** (e-mail)

Roční předplatné Informila **400,-Kč** (v obálkách), **nebo 200,-Kč** (v e-mailu)

Při platbách vždy uveďte **vaše příjmení** jako variabilní symbol!

Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.

Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z

La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.